



Centjara Jubileo de Esperanto

La 26a de julio de la jaro 1887 aperis libro de Lazaro Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, prezentante al la publiko tiun Internacian Lingvon. Kvankam tiam la idiomo estis jam finpreta kaj estis jam farita multe da laboro pri kaj por ĝi, tamen oni konsideras tiun daton kiel la oficiala naskiĝo de **Esperanto**.

Do, en la jaro 1987 la tutmonda esperantistaro sole nis tiun eventon per divers- tipaj aktoj. **Universala Esperanto-Asocio** okazigis la tiujaran Universalan Kongreson de Esperanto en Polujo, patrolando de la inici- atinto de la Lingvo Internacia. Kelkaj membroj de **Astura Esperanta Asocio** partoprenis en tiu grava fo- rumo de la tutmonda esper- antismo. La Prezidanto, S. Mulas, kaj la Sekretario, Julio Argüelles, ĉeestis an- kaŭ la landan kongreson de Esperanto, kiu tiujare oka- zis en Madrido.

Sed nia Gijona E-rondo el- pensis kaj entreprenis alian gravan faron por inde festi la Centjariĝon de Esperan- to. La iniciato de la samide- anoj de nia urbo estis la el- donado de libro en Esper- anto, konkrete, antologio de asturaj verkistoj de la jar- cento pasinta ekde la apero de la internacia lingvo.

La elektitaj aŭtoroj de la Asturia regiono estis:

- Ramón de Campoamor, kaj ties verko "La trajno ekspresa", kiun esperantigis Fernando de Diego.
- Ramón Pérez de Ayala, el kiu estis io tradukita de Fernando de Diego: la "Universala Danco".
- Ángel González, el kiu majstre tradukis al Esper- anto kelkajn poemojn Jorge Camacho.
- Armando Palacio Valdés, el kiu estis prenitaj, por nia eldonaĵo, du verketoj: "La bobeloj" kaj "Peĉjo la bona", esperantigitaj de Liven Dek.
- Leopoldo Alas (Clarín), kaj ties verkoj "Adiaŭ Cordera" k.a. tradukitaj de Fernando de Diego.

Oni povas diri ke la komuna trajto de la menciitaj verkistoj estas, ke ili tre engaĝis sin en la spirito de sia epoko, de tiu jarcenta periodo dum kiu plen- umiĝis la plej kolosa evoluo kaj progreso de la ci- vilizacio. Tiu jarcento al kies progressa karaktero kontribuis ankaŭ la Internacia Lingvo, Esperanto, kies Centjaran jubileon oni festis per la eldono de ĉi tiu volumo.

La eldonado de la libro es- tis ebla dank' al la subven- cio kiun malavare koncesiis al ni la "Asturia Ŝparka- so". La volumo enkadriĝas en esperantista kolekto no- mata "Hispana Literaturo" en kiu estas E-tradukaĵoj de aliaj famkonataj verkoj kiel "La Familio de Pascual Du- arte", "La domo de Bernar- da Alba", "Sanga nupto", "Platero kaj mi"...

Plian informon pri tiu el- donado oni povas trovi en la retpaĝo de nia E-asocio, konkrete en la retadreso: <http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/abukedo/abukedo.html>


Por la prezentado de la libro **A.E.A.** kunvokis gazetaran konferencon. Ĝi rezultis su- fiĉe brila akto. La prezent- adon faris la Oficiala Urba Kronikisto, Patricio Adúriz. Poste la informmedioj iom publikigis pri la afero. Kon- krete, la Regiona Astura

Televizio intervjuis, por la prezentado de la libro, niajn samideanojn Santiago Mulas kaj Adonis González.

Ankaŭ kadre de la Centjara Jubileo de Esperanto, la E-grupo de Avilés, **ANTAŬEN**, havis alian iniciaton: al la priKultura Fonduso de tiu urbo, la tieaj gesamideanoj mendis proponi por la premio "Princo de Asturio al Konkordo" la internacian lingvon Esperanton. La Urba Kultura Fonduso de Avilés akceptis tiun peton kaj demarŝis la kon- cernan proponon, sed la afero ne prosperis.

Krom tiu speciala aktivado rilate al la Jubileo de Esperanto, la E-grupoj de Asturio pludaŭris en sia

astura bukedo



hispana literaturo